

INFORMACIJE

INFORMOJ

Leto / jaro 25, št. / n-ro 1

februar / februaro 2020

Uvodnik

Frontartikolo

Estas tempo de jarkunvenoj. La jarkunvenoj gravas. Ene de la Esperanto-societoj, oni resumas la rezultojn de la estinta jaro kaj starigas celajn kaj planojn en la formo de programoj kaj projektoj. Ni bezonas helpojn kaj kunlaboron de novaj kaj de la eksaj geanoj. Venu kaj kunagu!

V februarju in marcu se bodo zvrstili letni zbori naših organizacij. Ti občni zbori niso le administrativna navlaka, so tudi priložnost, ko povzamemo dosežke preteklega obdobja in formaliziramo načrte za prihodnost v obliki programov in projektov. Vtis je, da delamo kar dobro in smo opazni v družbenem okolju. Pridobili smo tudi nekaj novih članov, a je stopnja staranja in odhajanja vseeno večja od pomladitve. Pritegniti je treba zlasti izkušene esperantiste, ki so se nekoliko odmaknili od našega gibanja. Pomembno je, da vsi prispevamo k temu procesu s svojo udeležbo, še bolje z izpovedanim stališčem ali kakšno idejo. Dragi somišljeniki, potrebujemo vaš odziv in vaš prispevek, da lahko vztrajamo in omogočimo željeno raven delovanja našega gibanja. Zato ne izpustite občnih zborov kot nekaj nenujnega. Pridite in sodelujte! Ob tej priliki se vodstvo ZES zahvaljuje vsem, ki so podprli našo dejavnost z denarnimi prispevki, z delom, z materialnimi vložki in uslugami. **IO ZES**

Iz dejavnosti ZES

El la agado de SIEL



ZDRUŽENJE ZA ESPERANTO SLOVENIJE • SLOVENIA ESPERANTO-LIGO

Vabilo na skupščino ZES

Sklicujem redno letno Skupščino Zdrženja za esperanto Slovenije, ki bo

v soboto, 21. marca 2020, ob 10.00 v Ljubljani

v sejni sobi MOL – Oddelka za lokalno samoupravo, Štefanova 11.

Dnevni red:

1. Ugotovitev sklepčnosti
2. Sprejetje novega kolektivnega člana ZES
3. Izvolitev organov skupščine (delovnega predsedstva, zapisnikarja in dveh overiteljev zapisnika)
4. Poročilo o delu, finančno poročilo, poročilo Nadzornega odbora, razprava o poročilih
5. Razrešnica dosedanjim organom in izvolitev organov ZES za naslednje dvoletno obdobje
6. Program dela in finančni načrt za leto 2020 (predstavitev, razprava in sprejetje)
7. Razno

Prosim, da se skupščine zanesljivo udeležite. Če ob napovedanem času skupščina ne bo sklepčna, ker ne bo prisotna najmanj polovica članov, bo seja čez pol ure v istem prostoru. Takrat bo skupščina sklepčna, če bo navzočih najmanj 10 članov.

Poročilo o delu in finančno poročilo sta v prilogi, prav tako predlog Programa dela ter finančnega načrta za 2020. Ostalo gradivo boste prejeli na skupščini. Po uradnem delu bo v istem prostoru družabno srečanje. Pred začetkom skupščine in po njej boste lahko plačali članarino in kupili knjige.

Lep pozdrav in na svidenje!

Predsednik ZES
mag. Janez Jug I.r.

Zamenhofov dan 2019

Osrednja proslava ob 160. obletnici rojstva tvorca esperanta L. L. Zamenhova, Dneva esperantske knjige in Svetovnega dneva človekovih pravic je bila v Slovenj Gradcu 14. decembra v organizaciji esperantske sekcije pri Kulturnem društvu Slovenj Gradec in Zdrženja za esperanto Slovenije. Dogodek je potekal v prostorih Knjižnice Ksaverja Meška, Ronkova 4. Zbralo se je preko 40 esperantistov in prijateljev esperanta iz vse Slovenije, tako da je bila dvoranica prijetno polna. Bogat in raznovrsten program proslave je povezovala predstavica slovenjegraških esperantistov Ivica Hace. Za prijetno popestritev med posameznimi točkami programa je vokalno-instrumentalna skupina *Hedera vento* (*Bršljanov veter*) izvedla več pesmi, nekatere v esperantu.



Ivica Hace je povezovala program (Foto A.Ž.S.)

Pozdravni nagovor je imel predsednik ZES mag. Janez Jug. Na kratko je opisal glavne značilnosti in pomen dogodkov, katerih smo si želeli spomniti se s proslavo:

Spoštovani!

Esperantisti vsako leto 15. 12. praznujemo Zamenhofov dan in dan esperantske knjige, letos pa še 160. obletnico rojstva tvorca, očeta, začetnika ali pobudnika esperanta L. L. Zamenhofa. Ob tej priložnosti slovenski esperantisti dodamo še Svetovni dan človekovih pravic. Po našem mnenju je zavzemanje za mednarodni jezik esperanto sestavni del prizadevanja za uveljavljanje in ohranjanje človekovih pravic.

Ludvik L. Zamenhof se je rodil 15. 12. 1859 v Białystoku, v litovskem delu carske Rusije, zdaj pa je njegov rojstni kraj na Poljskem. Od zgodnjega otroštva je bil priča različnim oblikam narodnega in rasnega sovraštva, kar je imelo odločilen vpliv na njegovo življenje – in seveda tudi na nastanek esperanta.

V Białystoku so takrat živeli Rusi, Poljaki, Nemci in Judje. Vsak je govoril svoj jezik in bil sovražno razpoložen do drugih. Zamenhof je kot občutljiv otrok čutil težko breme jezikovne različnosti, ki ga je na vsakem koraku prepričevalo, da je različnost jezikov edini ali pa glavni vzrok, ki ločuje človeške družine in povzroča sovraštvo med njimi.

Vzgajali so ga kot idealista. Učili so ga, da so vsi ljudje bratje, hkrati pa je na vsakem koraku in povsod občutil, da ljudi ni, da so samo Rusi, Poljaki, Nemci in Judje itn. Za njegov otroško mišljenje je bilo to velika stiska. Vztrajno si je dopovedoval, da bo, ko bo odrasel, zanesljivo uničil to zlo.

Kot mlademu človeku so mu bile najbolj razumljive jezikovne razlike, na drugem mestu pa verske. Otroška misel, da ne bo več sovraštva med ljudmi, če bodo vsi govorili isti jezik, je bila naivna – toda zaradi nje je esperanto na svetu že 132 let.

Ko je bil star 15 let, leta 1875, je začel ustvarjati nov jezik. Leta 1878, v osmem razredu gimnazije, je

že izdelal svoj jezik – praesperanto I. In tako je 17. 12. 1878 povabil sošolce na svoj rojstni dan, v resnici pa so praznovali rojstvo novega jezika. Čez 9 let, 26. julija 1887, pa je izšla Prva knjiga in ta dan je rojstni dan esperanta.

Tu bom končal zgodbo Zamenhofovega življenja. Če želite izvedeti več o tem izjemnem človeku, imate v slovenščini na voljo dva njegova življenjepisa. Prvi je delo Marjorie Boulton: Zamenhof – oče esperanta iz leta 1987, drugi pa delo Edmonda Privata: Zamenhofovo življenje, ki nam ga bo kmalu predstavil Vinko Ošlak.

Slavnostno priložnost je predsednik ZES izkoristil tudi za svečano izročitev pisnega priznanja za častnega člana ZES mag. Vinku Ošlaku, ki mu ga je podelila skupščina ZES na zasedanju 16. marca 2019.



Častni član ZES Vinko Ošlak in predsednik ZES Janez Jug (Foto O.K.)



Desno krilo dvorane s skupino Hedera vento (Foto A.Ž.S.)

Vinko Ošlak, Mario Vetrih in Peter Grbec so nato predstavili najnovejšo žetev na področju esperantske knjige. Gre za tri zanimive dosežke, ki so vsak na svoj način pomembni za slovensko in esperantsko kulturo. Prvi je 3. popravljena izdaja Koserjeve *Popolne slovnice esperantskega jezika*, o čemer smo več že napisali v novembrski številki našega biltena na 4. strani. To

knjigo so prejeli brezplačno vsi naši člani in jo lahko uporabijo kot učbenik in kot dragocen primerek ustvarjalnosti prvih slovenskih esperantistov. Zahvala za finančno podporo in izvedbo gre Vinku Ošlaku in vrlim koroškimi esperantistom.


Drugi dosežek je prevod in izid v obliki elektronske knjige *Zamenhofovega življenja* izpod peresa Edmonda Privata. Tudi o tej knjigi si poglejte več podrobnosti na 4. strani prejšnje številke našega biltena. Vsebino knjige je na proslavi predstavil lektor knjige Vinko Ošlak, prisotna pa sta bila še prevajalka knjige Virineja Kajzer in izdajatelj Mario Vetrih. EDM je zagotovilo nekaj tiskanih izvodov, sicer pa imajo vsi člani in drugi zainteresirani možnost dobiti povezavo in elektronsko verzijo knjige brezplačno. Naj še dostavim, da je knjiga resnično prisrčna in zanimiva ter vam ne bo žal, ko jo boste prebrali v slovenskem prevodu.



Levo krilo dvoranice (Foto A.Ž.S.)

Tretji književni dogodek pa je malo v zamudi. Namen in pomen slovenske izdaje Marčekovega učbenika *Rekta metodo* je predstavil Peter Grbec. Slovensko verzijo knjige bomo natisnili v nakladi 200 izvodov, izšla pa bo v začetku leta 2020. Že tako zelo ugodno ceno bo mogoče zmanjšati s skupinskimi naročili in prednaročili društev in posameznikov.

Dragica Ropret Žumer je nato izvedla predstavo gledališča kamišibaj. Avtorsko predstavo sestavljajo njene ilustracije k Prešernovi *Nezakonski materi* in deklamacija pesmi, ki jo je prav za to priložnost Tomaž Longyka prepesnil v esperanto (glej tokratno rubriko *Leposlovni kotiček – Beletra angulo*). Prešernova *Nezakonska mati* je bila doslej prevedena v 11 drugih jezikov, zdaj se jim je pridružil še esperanto. Krstna uprizoritev v Slovenj Gradcu je pomembna zaradi še enega kakovostnega prevoda Prešernovih pesmi v esperanto ter zaradi povečanja števila predstav kamišibaj, ki so pomembno sredstvo za uvajanje esperanta v predšolsko vzgojo.



Predstava *kamišibaj* Dragice Ropret Žumer (Foto O.K.)

Krajšo predstavitev aktualnosti v zvezi s spletnim slovensko-esperantskim slovarjem Mice Petrič je podal Janez Jug. Gre predvsem za možnost neposrednega komentiranja posameznih sestavkov v slovarju na spletišču Termania. Komentar lahko med drugim vsebuje opažene napake, predloge za izboljšavo in dopolnitev, sinonime, nova gesla in podobno. Pooblaščen uredniki lahko nato ukrepajo in izvedejo spremembe v verziji slovarja, ki je javno dostopna. Sicer pa slovar stalno pridobiva na obsegu in točnosti, ker je zaradi svoje velike uporabnosti velikokrat obiskan.



Prikaz rasti slovarja Mice Petrič (Foto A.Ž.S.)

V zadnji točki programa je povezovalka Ivica Hace v obeh jezikih deklamirala svojo pesem *Vesolja mnogo*, ki jo je v esperanto prevedel Vinko Ošlak. Pesem je predstavljena tudi v tokratnem literarnem kotičku.

Po zaključku programa smo se živahno pogovarjali ob prigrizkih in pijači. Čas je kar prehitro minil, prišel je čas zapiranja knjižnice. Morali smo se na hitro posloviti od gostiteljev in udeležencev, ki so se razšli v različne smeri. A nekateri smo nadaljevali obisk v s snegom okrašenem Slovenj Gradcu z ogledom središča mesta s poklicno vodnico. V lepem sončnem vremenu, ne preveč hladnem in vetrovnem, se je nadaljevalo prijetno vzdušje proslave in globok občutek hvaležnosti

in zadovoljstva ob uspelem Zamenhofovem dnevu.

O.K.



Poziranje pri Kogojevem venetskem konju (Foto A.Ž.S.)

Iz dejavnosti EDL

El la agado de ESL

Vabilo na občni zbor EDL

Vabimo Vas na redni letni občni zbor Esperantskega društva Ljubljana, ki bo

v torek, 3. marca 2020, ob 18.00 uri v Ljubljani

v sejni sobi MOL – Oddelka za lokalno samoupravo, Štefanova 11.

Predlagam naslednji **dnevni red**:

1. Ugotovitev sklepčnosti, izvolitev organov občnega zbora (delovnega predsednika, zapisnikarja in dveh overovateljev zapisnika) in potrditev dnevnega reda
2. Poročilo o delu, finančno poročilo in poročilo Nadzornega odbora za leto 2019
3. Razprava in sprejemanje poročil ter razrešnica dosedanjim organom društva
4. Izvolitev organov društva za naslednje dvoletno obdobje
5. Predstavitev programa dela in finančnega načrta za leto 2020, razprava in sprejemanje
6. Delegiranje 5 zastopnikov društva za skupščino ZES
7. Razno

Po zaključku uradnega dela bo druženje in zakuska, možnost nabave literature in plačila članarine.

Prosim Vas, da se občnega zbora zanesljivo udeležite. Povabite in pripeljite na občni zbor še prijatelje esperanta in potencialne nove člane društva. Če ob predvidenem začetku občni zbor ne bo sklepčen, ker ne bo navzoča več kot polovica članov s pravico glasovanja, se bo začetek odložil za 30 minut, nakar bo občni zbor veljavno sklepal, če bo navzočih vsaj 10 članov (25. člen pravil EDL).

Lep pozdrav in dobrodošli!

Predsednica EDL
Nika Rožej I.r.

Ob slovenskem kulturnem prazniku Prešeren tudi v esperantu

Ob slovenskem kulturnem prazniku na številnih prireditvah po državi predstavljajo Prešernove pesmi. Letos je njegova pesem *Nezakonska mati*, v prevodu Tomaža Longyke, zazvenela tudi v esperantu in to kar na treh različnih prireditvah. Za to so poskrbele Nika Rožej in Dragica Ropret Žumer iz Esperantskega društva Ljubljana ter predsednica Kluba Liberius Cerklje prof. Daniela Močnik.

Dragica Ropret Žumer je predstavo kamišibaj *Needzeca patrino* odigrala dvakrat. Prvič 7. februarja v Knjižnici Blaža Kumerdeja Bled na kulturnem dogodku ob otvoritvi fotografske razstave Franca Ferjana (povezava do fotogalerije v matični Knjižnici A. T. L. Radovljica: <https://galerija.rad.sik.si/index.php?category/855>), drugič pa 10. februarja v Knjižnici Zalog ob srečanju bralne skupine, katere članica je tudi sama.



Prešernova Needzeca patrino na Bledu (Foto A.Ž.S.)

Nika Rožej in Daniela Močnik pa sta pesem *Nezakonska mati* v slovenščini in esperantu recitali pred Prešernovim gledališčem v Kranju na prireditvi v okviru Prešernovega semnja. Po prireditvah so se izvajalke s poslušalci zapletle v prijeten klepet tudi o esperantu. **D.R.Ž.**



Prešernov smenj v Kranju (Foto N.R.)

Esperanto za otroke v Knjižnici Bled

Lep sončen dan na začetku šolskih počitnic, namreč 14. februarja, je bolj vabil na sprehod kot v knjižnico. A vendar se je ob 17. uri v Knjižnici Bled zbralo 12 otrok in 13 odraslih spremljevalcev, da so prisostvovali delavnici *Z esperantom v pravljčni svet*. Za večino prisotnih je bilo to prvo srečanje z gledališčem kamišibaj in z esperantom.



Večji otroci so še bolj sodelovali (Foto A.Ž.S.)

Otroci so se s pripovedjo Dragice Ropret Žumer na igriv način seznanili z esperantom. Med ogledom štirih kratkih kamišibajskih predstav (*Mušo*, *Koloroj*, *Ludemaj nombroj*, *La raŭpo dormas*) so spoznavali esperantske besede za barve in dele telesa, v esperantu pa so se naučili tudi pozdravljati in šteti. Domov so otroci odnesli mini slovarček z uporabljenimi esperantskimi besedami in pobarvanko z zaspano gosenco, odrasli pa zgibanko ZES z osnovnimi informacijami o esperantu.

Več slik o tem dogodku si lahko ogledate v galeriji Knjižnice A. T. Linharta Radovljica s pomočjo povezave <https://galerija.rad.sik.si/index.php?/category/863>.
O.K.



Zgodbo o gosenci so otroci obnovili še po slovensko (Foto O.K.)

Esperanto-kurso en la urbo Kranj

Ankaŭ en la jaro 2020 plue daŭras Esperanta rondo, nomata *La ĝojigaj horetoj* en la Intergeneracia Centro Kranj. Oni renkontiĝas je la 18:45 la duan kaj la kvaran mardon ĉiumonate. La programo de la kurso estas tre diversa kaj oni fasonas ĝin foje kune kaj improvize. La etoso estas neformala kaj malstreĉita.

Komence de februaro, ni renkontis tie krom kvar spertaj esperantistoj ankaŭ tri komencantinojn, novajn membrojn de la Esperanto-Societo Ljubljana. O.K.



La ĝojigaj horetoj en Kranj (Foto O.K.)

Iz dejavnosti EDM

El la agado de ESM



Skupščina EDM

Redno letno skupščino EDM je predsednik društva Mario Vetrih skical za četrtek, 20. februarja 2020 ob

17. uri v sejni sobi Mestne četrti Center, Kacova 1, Maribor.

Dnevni red:

1. Izbira delovnega predsedstva
2. Ugotovitev sklepčnosti
3. Poročilo o delu v letu 2019
4. Finančno poročilo za leto 2019
5. Poročilo Nadzornega odbora
6. Razprava o poročilih in sprejem poročil
7. Načrt dela in razprava o načrtu dela za leto 2020
8. Predavanje Vinka Ošlaka ob Mednarodnem dnevu materne jezika
9. Razno (= pogovor ob pecivu in soku).

O poteku skupščine EDM in sprejetih sklepih bomo podrobneje še poročali v naslednjim številki našega biltena, ki bo, kot je v navadi, posvečen letnim zborom naših organizacij.

Predstavitev *Blejskega zvona* v Mariboru

Predstavitev dvojezične knjige *La sonorilo de Bled – Blejski zvon*, ki je bila v torek 7. januarja 2020 ob 17. uri v večnamenski dvorani Rotovž, Rotovski trg 2 (nad Knjižnico Rotovž). Prisostvovalo je dobrih 20 zainteresiranih udeležencev. Knjigo je predstavil Vinko Ošlak.



Med poslušalci je bilo mnogo esperantistov (Foto Z. K.)

Zaenkrat esperantska jezikovna skupnost bolje pozna Slovenijo, kakor pa slovenska literarna zgodovina esperantsko kulturo in literaturo saj je bil že v letu 1925 v mednarodnem jeziku esperantu napisan roman, ki se godi na Slovenskem, na Bledu in okolici, čeprav nekoliko tudi v daljni Indiji: *La sonorilo de Bled / Blejski zvon* srbskega esperantskega pisatelja, sicer pa zdravnika, ki je deloval med Slovenci, dr. Stevana Živanovića. Roman je prvič izšel šele leta 1959 v Beogradu, 20 let po pisateljevi smrti. Knjigo je pred nekaj leti odkril upokojeni direktor mariborske carinarnice, lani umrli Milan Jarnovič, v NUK-u v

Ljubljani. Kot začetnik v učenju esperanta se je takoj lotil prevajanja najdene knjige v slovenščino, za lastno vajo v jeziku, brez pomisli na morebitno objavo. Esperantsko društvo v Mariboru je v letu 2018 po optičnem razpoznavanju znakov (OCR) in lektoriranju obeh besedil knjigo izdalo v dvojezični postavitvi. Vir: vabilo na dogodek

Iz dejavnosti ŽED

El la agado de FES



Železničarsko Esperantsko Društvo
Društvo za uporabo Mednarodnega jezika v prometu
Fervojista Esperanto Societo
Societo por apliko de Internacia lingvo en la trafiko

Invito al la jarkunveno de FES-anoj

FES invitas al la jarkunveno marde, la 10-an de marto 2020 en Maribor, en ejoj de Urba kvartalo Radvanje, Lackova-strato 43, je la 11-a horo. Kiel gastoj estas invitataj ankaŭ niaj amikoj esperantistoj el Graz.

Tagordo:

1. Saluto al anoj kaj gastoj, konstato de la kvorumo
2. Elekto de la organoj de la kunveno: laborprezidanto, protokolanto kaj du konfirmantoj de la protokolo
3. Raporto pri laboro en 2019, financa raporto, debato pri raportoj
4. Labora kaj financa plano por la jaro 2020, debato
5. Diversaĵoj – salutvortoj de gastoj ktp.
6. Kuniĝado kaj manĝetado kun trinkaĵoj ene de samaj ejoj
7. Je la 12:45 ni veturos 1,5 km antaŭen kaj per ronda ŝnurfervojo (Pohorska vzpenjača) veturos supren kaj sur abs. alteco preskaŭ 1000 m trinki kafon kaj ĝui rigardon al Maribor. Je la 14-a ni revenos malsupren por adiaŭi.

Aliro al la ejoj de Urba kvartalo (Mestna četrt) Radvanje, Lackova-strato 43: per aŭtomobilo oni devas sekvi direkton Pohorje, sur strato »Lackova cesta« esti atentaj – dekstre estas gastejo (gostilna) »Pri lipi (ĉe tilio)« – STARA LIPA (maljuna tilio) kaj maldekstre en distanco 100 m nia celo.

Anoncojn de partopreno de la kunveno ni atendas ĝis ĵaŭdo, la 5-a de marto al la retpoŝt-adreso: karl.kovac@amis.net, poŝte: Esperanto, Varlovo naselje 2, SI-2000 Maribor, poŝtelefono 00386 41 909 266 – Karlo, 00386 31 670 846 – Jovan.

Ĝentile invitataj – Estraro de FES

France Prešeren:

Nezakonska mati

*Kaj pa je tebe treba biló,
dete ljubó, dete lepó,
meni mladi dekljici,
neporočeni materi?!*

*Oča so kleli, tepli me,
mati nad mano jokali se;
moji se mene sram'vali so,
tuji za mano kazali so.*

*On, ki je sam bil ljubi moj,
on, ki je pravi oče tvoj,
šel je po svetu, Bog ve kam ...
Tebe in mene ga je sram!*

*Kaj pa je tebe treba biló,
dete ljubó, dete lepó!
Al te je treba biló, al ne,
vendar presrčno ljubim te.*

*Meni nebo odprto se zdi,
kadar se v tvoje ozrem oči;
kadar prijazno nasmeješ se,
kar sem prestala, pozabljeno je.*

*On, ki ptice pod nebom živi,
naj ti dá srečne, vesele dni!
Al te je treba biló, al ne,
vedno bom srčno ljubila te.*

France Prešeren (ĉirkaŭ 1843):

Needzeca patrino

Elslovenigis Tomaž Longyka, novembre 2019

*Ĉu mi entute bezonis vin, bebo,
kara, belega, mia bebo,
mi, rose juna knabino,
needziniĝinta patrino?*

*Patro malbenis, batis min,
mia patrino priploris min,
miaj parencoj hontis min,
fremduloj per fingroj montradis min.*

*Li, amorinto kara de mi,
li, vera patro, bebo, de vi,
li tra la mondo ie vagantas,
vin kaj min li prihontas.*

*Ĉu mi entute bezonis vin, bebo,
kara, belega mia bebo?
Ĉu vi estis aŭ ne bezonata –
vi estas de mi elkore amata.*

*Ĉielo malfermiĝi aspektas,
kiam rigardon vian mi kaptas,
kiam vi dolĉe ekridetas;
kion mi suferis, forgesitas.*

*Li, kiu subĉiele nutras birdojn,
verŝu sur vin plej bonajn virtojn!
Ĉu vi estis aŭ ne bezonata,
ĉiam vi estos mia bebo amata.*

Ivica Hace (iz zbirke *V ĉolnu iz rdeĉih ĉrk*, 2005):**Veselja mnogo**

*Veselja mnogo,
radosti in sreĉe,
prinese ti adventni ĉas,
ĉe v srcu občutiti znaŝ
lepoto dni, skrivnosti ĉar,
sij sveĉe ...*

*Lepota teh dni
naj mir utrdi,
naj blagor v duŝi
se nikdar ne zruŝi.*

*Željà izreĉenost
ni zaslepljenost,
je moĉ in zagon ...
Naj njih ŝirjave
dobjo ŝe veĉji razpon!*

Ivica Hace (el la kolekto *V ĉolnu iz rdeĉih ĉrk*, 2005):**Da plezuro plene**

Elslovenigis Vinko Oŝlak

*Da plezuro plene,
kaj da ĝoj', feliĉo,
al vi alportu temp' adventa,
se en kor' vi senti scias
de la tagoj varmon, ĉarmmiraklon,
brilon de la kandelaro ...*

*La belo de la tag' festena
pacon plifirmigu,
la feliĉ' anima
neniam detruigu!*

*Diro deziranta
ne similas al blindeco,
sed al forto kaj elano ...
Kaj la vast' ilia
havu pli da larĝo!*

Komentiramo

Ni komentas

Vi povas aliri la preparolatan tekston de L. L. Zamenhof Esperante per la suba retligilo: <http://esperanto-aalen.de/biblioteko/skanite/testamento/libreto-red.pdf>.

Vinko Oŝlak:

Pri la Alvoko al la diplomatoj de L. L. Zamenhof

Plena titolo: **Post la granda milito. Alvoko al la diplomatoj** (unue publikigita en *The British Esperantist*, 1915, №123, p. 51–55).



Mi ne scias, ĉu tiu ĉi alvoko al la diplomatoj sin ektrovis antaŭ la okuloj de iu ajn diplomato de la mondo, kia ĝi estis en la dua jaro de la »granda milito«, kiel la francoj diras, en la jaro 1915, kiam ĝi unue aperis en la brita esperantista gazeto en la lingvoj internacia kaj paralele la angla. Sed, bone, eĉ se tiu aŭ tiu tiama diplomato inter siaj kolegoj riskis esti priridita, ĉar perdanta tempon kaj honoron per kuriozaĵo de certa duonreligia sekto, kiel la afero de la esperantistoj tiam kaj parte ĝis nun

estis vidita, kaj legis la alvokon de Zamenhof, tio havus nenian politikan, eĉ ne spiritan kaj mensan efikon, ja la diplomatoj de la mondaj ŝtatoj laŭ la sistemo de sia ofico ne reprezentas la interesojn de justeco kaj paco, sed ekskluzive de siaj regantoj, senrigarde, kiaj tiuj regantoj estas. Ĉiam tiel estis kaj restos.

Koncerne tiun ĉi tekston de Zamenhof indas diri kelkajn sobrigajn vortojn. Zamenhof naive kredis, ke en la politiko decidis tiuj personoj, kiujn oni povas vidi sur la politika podio kaj sur la frontpaĝoj de la gazetaro, nuntempe sur la televidaj kaj komputilaj ekranoj, do: la laŭnoma regnestro, la registaro, la parlamento kaj la diplomata koruso. Tia naiva imago de la plimultaj homoj restis sama ĝis niaj tagoj, tial la »regantoj en la ombro« havas facilan laboron. Se Zamenhof tiujn bazajn regulojn de la politiko konus, li sian alvokon ne adresus al la diplomatoj, sed al la posedantoj kaj direktoroj de kelkaj plej gravaj transnaciaj bankoj kaj al la grandmajstroj de la plej gravaj framasojn loĝioj. Tiuj personoj cetere estas »regantoj en la ombro«, sed tio ne estas jam la lasta kaj findecida garnituro de vera aŭtoritato, ja malantaŭ ili troviĝas ankoraŭ »regantoj de mallumo«, pri kiuj ĉi tie ne temas. Se Zamenhof estus ankaŭ rilate al tio ĉi pli sobra, li pri la konstanta paco estus skribinta al neniu, ja li devus scii, ke al la homaro ne estas donite mem, per propraj rimedoj kaj metodoj kaj klopodoj atingi la tutmondan kaj konstantan pacon. Unuflanke li bone konis la judan parton de la Biblio – Tanaĥ – ĉe la kristanoj nomata Malnova Testamento, ja li mem tradukis ĝin el la originaj lingvoj la hebrea kaj la aramea en Esperanton, eĉ tre bone. Sed aliflanke li ne konis la Novan Testamenton, nome en la senco de la fido, ke ankaŭ tio estas la vorto de Dio, tial li falis en iluzion, ke la universalan kaj konstantan pacon oni povas atingi surbaze de morala persvadado kaj decido kaj per la homaj fortoj kaj rimedoj, inter alie tiel, ke oni sendas al la diplomatoj saĝan alvokon ...

Tio ne signifas, ke liaj surprize trafaj antaŭdiroj, preskaŭ profetaĵoj, estus falsaj, ĝuste kontraŭe! Ankaŭ kelkaj liaj konkretaj ideoj estas tute raciaj. Ekzemple, ke la ŝtatoj ne estu nomataj laŭ la plej forta gento, en ĝi loĝanta, per kio la struktura maljustaĵo jam estas donita, sed gente neŭtrale, ekzemple laŭ geografiaj fenomenoj. Verdire surprize multaj regnoj tiun ĉi ideon, ĉu konscie, ĉu senkonscie, jam delonge efektive vigis, tamen tio ne gvidis al la paco kaj justeco en tia ŝtato kaj en rilato kun aliaj ŝtatoj. Tamen tio estas racia kaj justa solvo. Ekzemplo de tia solvo estas Aŭstrio, ĝis 1918 monarkio, poste respubliko. Ĝia nomo venas ne de certa gento, sed el la mezepoka esprimo »*ostariki*«

(=orienta regno), kiu signifas ankaŭ la katolikan mision al la Oriento. Sed malgraŭ tio, ke la ŝtatnomo Aŭstrio markas nek la germanan nek la slovenan nek la hungaran aŭ ciganan genton ene de sia limo, tio havis absolute nenian influon al la justa aranĝo de la rilatoj inter la unuopaj gentoj kaj iliaj lingvoj – nur dum lastaj 20 jaroj la situacio tre forte pliboniĝis, tamen ne danke al la neŭtrala ŝtatnomo. Ankaŭ la jugoslavia reĝo Aleksandar Karađorđević la proksimume nunajn memstaraĵajn ŝtatojn nomis laŭ la riveroj; tiel la nuna Slovenio estis »Dravska banovina« (Duklando de Drava), ĉar li volis politikpreme krei fikтивan komunan jugoslavian genton, kies lingvo kompreneble estus ne iu neŭtrala sudslava komuna lingvo, kian oni povus konstrui, sed la serba lingvo, ĝis 1991 nomita »serb-kroata«. Ankaŭ tiu parte justa kaj racia maniero nomi la unuopajn partojn de la ŝtato, ne kondukis al la paco kaj justeco, sed ĝuste kontraŭe, al la terura 3-a balkana milito. La nomo de la tuta ŝtato kompreneble ne estis neŭtrala, ja en Jugoslavio (= Sudslavio) vivis ne nur sudslavaj gentoj, sed ankaŭ albanoj, rumanoj, turkoj, ciganoj, germanoj, italoj, hungaroj ktp. Sed eĉ se Jugoslavio nomiĝus Ilirio (okcidentbalkana vazala ŝtato sub Napoleono), kaj eĉ se iu komponus neŭtralan tutilirian lingvon, la justico kaj la paco ne aperus, sed la milito tre verŝajne okazus. Ja troviĝas multaj aliaj ekzemploj kun la sama neŭtrala solvo, sed tamen kondukanta al kruelaĵoj. Tiel Usono (Unuiĝintaj ŝtatoj de Ameriko) estas gente plene neŭtrala nomo; eĉ la lingvo angla ne estas ofice deviga ŝtatlingvo, ĝi nur estas praktike ĉie uzata, kaj tamen okazis unu el la plej teruraj intercivitanaĵoj meze de la 19-a jarcento; troviĝis oficiala sklavsistemo ĝis 1864; troviĝis kruda rasisma divido inter la loĝantaro kaj parte daŭre troviĝas ĝis nun. La intercivitana milito okazis inter la armeoj kun la sama angla lingvo! La serio de similaj regnoj kaj okazintaĵoj, pravas, ke veraj kaŭzoj de la militoj ne troviĝas sur la demandoj lingvaj kaj simbolaj, sed multe pli profunde.

Estas interese, ke Zamenhof evidente sentis antaŭ la diplomatoj tian respekton, ke li en sia alvoko la solan logikan solvon por starigi la intergentan kaj interlingvan justecon jam ene de unu ŝtato, por ne diri inter la ŝtatoj, la neŭtralan lingvon kaj ĝian edukan ideon, eĉ ne mencias. Anstataŭ tio li kontentigas sin per putra kompromiso, tute ekster la esperanta pensmaniero, dirante, ke la publikaj institucioj, kaj li verŝajne unuarange pensis pri la ŝtataj instancoj, povas escepte uzi la plej fortan lingvon en la ŝtato kiel la »ŝtatan lingvon«, sen ke tio humiligu la ceterajn gentojn kaj ilian lingvan senton – kiel cedon de la malplimulto al la plimulto simple pro praktikaj motivoj. Nu bone, se tio estus bona solvo ene de unu ŝtato, kial do ne ankaŭ inter la ŝtatoj tutmonde – kaj tiel per la mondlingvo, tiutempe

la franca, nuntempe la angla, la problemo estus solvita kaj lia Esperanto estus en la planlingva muzeo ene de la Nacia biblioteko en Vieno deponita kiel unu el mil kaj pli kuriozaj eksperimentoj, kiel solvi la tutmondan lingvan problemon. Estas interese, ke tiu nekonsekvenco de Zamenhof markis ankaŭ la unuajn generaciojn de esperantistoj, kaj tiel ili tute ne pensis pri tio, ke Esperanto povus racie kaj juste solvi ne nur la lingvan problemon inter la ŝtatoj, sed same ankaŭ interne de unu ŝtato, en kiu loĝas pluraj gentoj kun pluraj lingvoj. Mi bone rememoras, ke mi kiel juna esperantisto en Labako (Ljubljana) en mia menso skandaliĝis aŭdinte la aserton de iu tre renoma slovena esperantisto, ke la lingva problemo en Jugoslavio estas solvita per la serb-kroata lingvo, kiu ankaŭ en la armeo estis leĝe privilegiita kiel la deviga komuna lingvo. Sed jam Zamenhof plurloke esprimis opinion, ke ene de la regnoj la afero estas solvita per la ĉiama »ŝtata lingvo«, kiel en la rusa cara regno – kaj tion heredis ankaŭ posta Sovetunio – per la rusa.

Kvankam do Zamenhof ĉi tie Esperanton prisilentas, por ne flamigi la sinjorojn diplomatojn jam tuj per la unua frazo de sia alvoko, indas ankaŭ koncerne la iluzion, ke Esperanto almenaŭ certagrade povus kontribui al la starigo de konstanta universala paco, sobriĝe diri, ke tio estas plena utopiaĵo. La usona intercivitana milito estis estrita per politikistoj kaj generaloj, kaj batalita per soldatoj de la sama, angla lingvo. Ĉiuj tri balkanmilitoj okazis pliparte per la komuna serb-kroata lingvo (kompreneble estis grava ankaŭ la turka, sed okaze de la unuaj du balkanmilitoj preskaŭ ĉiuj slavaj popoloj en suda Balkano parolis ankaŭ la turkan). La tridekjara milito inter la katolika imperiestra kaj la protestanta dukara armeoj kaj la protestanta invadarmeo de la sveda reĝo Gustav Adolf pliparte okazis per uzo de la sama germana lingvo ambaŭflanke. Per tio ne estas asertite, ke Esperanto ne estus justa kaj racia solvo de la komunika ŝarĝo de gentoj kaj individuoj; sed oni devus liberiĝi de la iluzioj, ke ni havus garantion de universala kaj konstanta paco, se ĉiuj teranoj apud sia gepatra lingvo utiligus ankaŭ la neŭtralan kaj tiel justan komunan lingvon de Zamenhof, kiuj daŭre al la fenomeno kaj movado de Esperanto alkroĉiĝas.

Kial mi tiel intense pledas por forigo de ĉiuj iluzioj, kiujn oni povas rilate Esperanton konstati? Mi opinias, ke ĝuste la iluzioj kaj falsaj atendoj, kiuj sian fonton tamen havas unuflanke en ignoro de historiaj kaj aktualaj faktoj, kaj aliflanke en ignoro de la Dia vorto, prezentas la plej efikan baron por la prospero de Esperanto, kaj ne ekzemple la angla lingvo, ja nuntempe la plej sukcesaj lernprogramoj kaj la plej

ampleksa propagando por Esperanto okazas ĝuste en la angla ...

Multaj identigas Esperanton kaj ĝian »internan ideon« kun la doktrino de pacifismo. Tiuj ignoras la fakton, ke ĝuste la pacifisma doktrino antaŭ la dua mondmilito, kian prezentis ankaŭ la tiama brita ĉefministro Arthur Chamberlain, per cedoj al Hitler kuraĝigis la estron de la germana nacionalsocialismo kaj ebligis komencon de liaj konkeraj militoj, kio en 1941 iĝis la dua mondmilito. Pacifistoj unuaŝajne plenumas la promeson de Jesuo en lia Prediko sur la monto: *»Feliĉaj estas la pacigantoj, ĉar filoj de Dio ili estos nomataj«* (Mat 5,9). Nome, tiu ĉi eldiro de Jesuo ne promesas, ke la »pacigantoj« la pacon ankaŭ vere atingas. Temas nur pri tio, ke la ĝusta sinteno de la vera disĉiplo de Jesuo estas, kie ajn nur eble, kondukti pace kaj en sia ĉirkaŭo kaj domeno zorgi por packarakteraj cirkonstancoj. La samon diras apostolo Paŭlo: *»Tial ni, pravigite per fido, havu pacon kun Dio per nia Sinjoro Jesuo Kristo«* (Rom 5,1a); aŭ sekve: *»Se estos eble, restu pacaj viaparte kun ĉiuj homoj«* (Rom 12,18); aŭ sekve: *»Ni do celu tion, kio apartenas al paco kaj al reciproka edifo«* (Rom 14,19). Ĉio-ĉi estas spronoj por pace kondukti kaj pace klopodi, sed tio ne estas promeso, ke la homoj la pacon, nome la universalan kaj konstantan, povus starigi. Tia promeso troviĝas, sed ne fare de la homoj: *»Pacon mi lasas al vi; mian pacon mi donas al vi; ne kiel la mondo donas, mi donas al vi«* (Joh 14,27). Tio ĉi ne jam estas la malmilita paco inter la nacioj, sed la spirita paco ene de la veraj disĉiploj de Jesuo, kiu ekzistas ankaŭ, se ili troviĝas meze de persekutado, militado kaj aliaj formoj de malpaco ekstera. Tamen troviĝas ankaŭ promeso kaj profetaĵo pri la universala kaj konstanta paco: *»Kaj Li juĝos inter la nacioj, kaj Li decidus pri multaj popoloj; kaj ili forĝos el siaj glavoj plugilojn kaj el siaj lancoj rikoltilojn; ne levos nacio glavon kontraŭ nacion, kaj oni ne plu lernos militon«* (Jes 2,4); same alia profeto: *»Kaj Li juĝos inter multe da popoloj, kaj Li decidus pri potencaj nacioj en landoj malproksimaj; kaj ili forĝos el siaj glavoj plugilojn kaj el siaj lancoj rikoltilojn; ne levos nacio glavon kontraŭ nacion, kaj oni ne plu lernos militon«* (Miĥ 4,3). Dum en la kapoj de la esperantistoj Esperanto estas argumentata per iluzia atendo de universala justeco kaj paco en la mondo, ĝi mem restas iluzio kaj tiel longe ne ankaŭ homara realo. Kio do estas la aŭtenta argumento de Esperanto? Per kio pledi je ĝi? Ankaŭ tion proponas la vorto de Dio: *»Reciproke subtenadu viajn ŝarĝojn, kaj tiamaniere plenumu la leĝon de Kristo«* (Gal 6,2). Fakto estas, ke la lingva kaj tiel kompleta komunika situacio en la mondo estas peza ŝarĝo je du niveloj. Unue, ĉar la reciproka kompreno estas tre malhelpata kaj same sub la nivelo de propra nacia

horizonto – kaj due, eĉ multe pli destine, ke la lingva diverseco estas akompanata per reciproka malsolidaro, malsimpatio kaj malamo. Tiun grandegan ŝarĝon en la historio la popoloj kaj la individuoj ne portis egale, sed same maljuste, kiel ne ĉiuj egale portas la ŝarĝon de baza prizorgo per vivnepraĵoj. Kiel en la ekonomio, politiko, scienco kaj kulturo kelkaj nacioj sin sentas kaj kondukas kaj procedas kiel »mastroj«, la aliaj devas kondukti kaj kontribui kiel parioj aŭ eĉ kiel plene senrajtaj sklavo, la samo ripetiĝas sur la kampo de komunikado. Eĉ se Esperanto ne povas starigi plenan justecon en la mondo kaj same ne la universalan kaj konstantan pacon, ĝi laŭ sia origina intenco kaj esenco ĝi estas justa kontribuo por proporcie dividi la pezan ŝarĝon de la homa komunikado inter ĉiuj nacioj kaj individuoj. Tio ne estas iluzio, jam ĉe la plej etaj situacioj tio estas faro, konvena al la vortoj de apostolo Paŭlo, kiel plenumi la leĝon de Kristo – nome, reciproke subtenadi niajn ŝarĝojn. Se tiel, la esperantistoj povus ĉesi aperi kiel fantaziuloj kaj iluziistoj, kiuj promesas ion, kion neniuj homoj kaj neniuj nacioj povas plenumi – kaj tiel ankaŭ la lingvo de Zamenhof ne plu estus fantaziaĵo, forgesita en la arkivoj de homaj utopiaĵoj. Ni havas elekton.

Obvestila in vabila

Informoj kaj invitoj

21-a Esperanto-konferenco de Alp-Adrio

1-a bulteno



Rijeka (Kroatujo) 05-07 de junio 2020

Konferencejo: Palazzo Modello,
Str. Uljarska 1, Rijeka
Sekretario: Edvige Ackerman
(noredv@tiscali.it)

Temo de la konferenco: Per Esperanto trans limoj (kunlabore kun la itala komunumo en Rijeka)

Programo provizora:

La 5-an de junio (vendredo)

16:00 – 20:00 – akceptado de partoprenantoj

20:00 – interkona vespero

La 6-an de junio

10:00 – malfermo de la konferenco

10:30 – Alp-Adrio-konferenca iniciativo (temoj, diskutoj)

12:30 – prelegoj de esperantaj societoj

13.30 – tagmanĝo

15:30 – prezento de la libro de Spomenka Štimec

16:00 – recitaloj, je dialektoj, triesta kaj fiumana

18:00 – amuza vespero: deklamado je diversaj lingvoj-laŭ aliĝo

20:00 – fermo de la programo

La 7-an de junio

10:00 – ekskurso, se vetero permesos, per ŝipo al insulo Krk kun ĉiĉerono (mendo – pago aparte)

15:00 – fermo de la konferenco kaj adiaŭo.

Aliĝo al la konferenco: 10€, pageblaj je kunoj aŭ euroj surloke. Preferinde aliĝu antaŭ la 1-a de marto pro organizaj problemoj de loĝado. Aliĝu papere aŭ rete al „Esperanto-Societo Rijeka“, Blaža Polića 2, HR-51000, RIJEKA. Rete: esperanto.rijeka@htnet.hr aŭ bdesperanto4@gmail.com.

Loĝado:

Eblas loĝi en hoteloj (Kontinental***, Neboder*** kaj Lucija**), aŭ en hosteloj. Hoteloj Kontinental kaj Neboder situas en proksimeco de la konferencejo (kelkajn centojn da metroj), sed Lucija estas en antaŭurbo. Neboder kaj Lucija havas propran parkejojn.

Prezaro de loĝado en hoteloj: Tranokto kun matenmanĝo: ekde 70 ĝis 104 € en unulita ĉambro, 88 ĝis 128 € en dulita ĉambro. Aparta tagmanĝo aŭ vespermanĝo 15 ĝis 20€.

Prezaro de loĝado en hosteloj: Nur tranoktado: ekde 31 ĝis 51€. Tranoktado en Hostelo sur boato: 85€. Turisma takso kaj asekuro 1€ tage
Aŭtoparkejo liberas post 14a horo sabate kaj dimanĉe tuttage.

Noto: eblas veni antaŭe kaj resti poste laŭ samaj prezoj, se vi rezervigos antaŭe.

Ekskurso: per ŝipo trans golfo Kvarnero ĝis la urbo Krk sur la insulo Krk kaj tagmanĝo sur la ŝipo. Kutime fritita aŭ rostita fiŝo kun aldonaĵo. Ekskurso gvidos ĉiĉeronino. Se iu ne preferas fiŝon eblas havi alian menuon sed necesas anonciĝi antaŭe. La prezo de ekskurso estas 50€ po persono.

Luminesk' 19/20

De la 28-a decembro ĝis la 3-a januaro en bavara urbo Nördlingen okazis la 5-a Luminesk'. Inter 53 partoprenantoj el 10 landoj oni povas trovi nur unu slovenon – Davorin Jurač. La programo estis abunda kaj interesa. Mi elektis kelkajn prelegojn: »Fabeloj« de Anna S., »Esplorado de ekstertera vivo« de Amrio W., »Manĝebla arbaro« de Patricia G. kaj kelkajn aliajn. Okazis ankaŭ kelkaj ekskursoj: tra mezepoka parto de la urbo kaj vizito de germana fervoja muzeo.

Dum silvestra vespero okazis konkurso »Majstro kuiristo«, tradicia poloneza balo kaj muziko kaj kantoj. La Nova Jaro venis kvaroble: unue je la 22-a laŭ la

moskva tempo, due unu horon poste laŭ la israela tempo, trie laŭ la mezeŭropa tempo kaj fine je la 1-a laŭ la tempo de Britujo. La evento tre plaĉis al mi, ĉar inter esperantistoj oni ne devas enuiĝi. **D.J.**



La prelegoj Luminesk' 19/20 (Foto D. J.)

Pli pri Luminesk' (Nova silvestra renkontiĝo de Germana Esperanto-Asocio) oni povas legi germane kaj/aŭ Esperante en la paĝaro:

<https://www.esperanto.de/de/enhavo/luminesk-201920-0>.

Koresponda servo de JEI

Se vi interesiĝas pri korespondado kun japanoj, bonvolu turni vin al

Koresponda Servo de Japana Esperanto Instituto,
Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3, Tokio,
162-0042 Japanujo.

Skribante al la koresponda servo korespondan peton, bonvolu aldoni vian aĝon, sekson, profesion, interesojn kaj viajn preferojn por faciligi la peradon.

Jarkotizoj de SIEL kaj ESL

Letna ĉlanarina ZES za individualne ĉlane je 12 € za zaposlene, 6 € za ŝtudente, upokoĵence in brezposelne ter 0 € za mlade do 18. leta. Ĉlanarino ali prostovoljne prispevke lahko plaĉate na sreĉanjih in sestankih ali na poslovni raĉun ZES pri Delavski hranilnici d. d. Ljubljana ŝt. SI56-6100-0001-2538-761 z obrazcem UPN. Kot kodo namena vpiŝete »char« in namen plaĉila: »priimek, ĉlanarina in ustrezno leto oz. obdobje«. Pri referenci vpiŝete kodo SI99, ostalo pa pustite prazno.

Letna ĉlanarina ED Ljubljana ostaja na ravni iz preŝnjega leta, to je 12 € za zaposlene, 6 € pa za brezposelne, upokoĵence in ŝtudente. Ĉlanarino ali prostovoljne prispevke lahko plaĉate na sreĉanjih in sestankih ali na poslovni raĉun EDL pri Delavski hranilnici d. d. Ljubljana ŝt. SI56-6100-0000-1703-764. Glejte ŝe navodilo za izpolnitev obrazca v zgornjem odstavku. **O.K.**

Kion oni legos en la sekvonta numero?

Por la sekvonta numero de *Informacijo / Informoj*, kiu aperos meze de aprilo 2020, ni antaŭvidas raportojn pri la jaraj kunvenoj de niaj societoj kaj pri la interesaj okazaĵoj dum la printempaj monatoj, krome ankaŭ diversajn informojn, anoncojn kaj artikolojn pri la agado en Esperantujo:

- slovena traduko de *Esperanto per rekta metodo*
- kion oni preparas por la 100-jara jubileo de ESL
- el la historio de nia movado ktp.

La redaktoro rekomendas sin por kontribuoj pri via agado, proponoj, komentarioj, fotoj kaj rimarkoj, kiuj povus interesi la legantaron. Aparte estas bonvenaj verkoj en Esperanto, ĉar ni ĉiuj bezonas ekzerciĝon kiel aŭtoroj kaj legantoj. **O.K.**

Pa ŝe to....

Kaj ankaŭ tion ĉi...



Universala Esperanto-Asocio

(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

N-ro 849 (2020-02-17)

Deklaro de UEA okaze de la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo, 21 februaro 2020

Unuiĝintaj Nacioj kaj ties membraj ŝtatoj alvokis al atingo de bonkvalita edukado por ĉiuj kiel la kvara el deksep Celoj por Daŭripova Evoluigo atingendaj ĝis la jaro 2030. Inter la antaŭvidataj rezultoj kaj la iloj por realigi tiun kvaran Celon por Daŭripova Evoluigo estas:

- Universala elementa kaj meza edukado
- Universala antaŭelementa edukado
- Universala kapablo legi kaj skribi inter la junularo
- Genra egaleco
- Efikaj lernaj medioj
- Kvalifikitaj instruistoj.

Tiu Celo supozigas, ke, se studentoj frekventas lernejojn sub zorgo de kvalifikitaj instruistoj, ili lernos.

Sed tie kuŝas silenta antaŭsupozo – nome ke la studentoj instruiĝu en lingvo kiun ili komprenas.

En multaj landoj kaj cirkonstancoj ili ne estas instruataj en la propraj lingvoj kaj oni malmulton faras por helpi ilin transiri al la lingvo de instruado. Tio ofte malavantaĝas ilin tutvive, nuligante la pozitivan de lerneja ĉeesto, de kompetenta instruado, kaj de investo en lerneja infrastrukturo. Sen instruado de lernantoj en lingvo kiun ili komprenas, ni forĵetas monon kaj, kun ĝi, promesplenajn vivojn.

Pro tio, UNESKO proklamis la 21-an de februaro Internacia Tago de la Gepatra Lingvo, festata ĉiujare. Ĝi ĉefe celas emfazi la edukajn avantaĝojn de uzado de la gepatra lingvo en lernejoj, precipe elementaj lernejoj. Infanoj lernas legi kaj skribi pli rapide en lingvo kiun ili plene scipovas – aŭ, pli precize, ili spertas malavantaĝon se ili devas komenci sian lernadon en lingvo kiun ili ne scipovas, parte aŭ komplete.

La Internacia Tago de la Gepatra Lingvo memorigas nin ankaŭ, ke en multaj mondopartoj al tutaj lingvoj mankas oficiala statuso, oni diskriminacias kontraŭ iliaj parolantoj kaj oni malatentas iliajn kulturajn valorojn.

Universala Esperanto-Asocio, kiel unu el malmultaj neregistaraj organizoj kiuj okupas sin pri lingvaj demandoj, fote subtenas la Internacian Tagon de la Gepatra Lingvo kaj ĝia mesaĝo de lingva justeco por ĉiuj. Kiel diris Audrey Azoulay, Ĝenerala Direktoro de UNESKO, en 2018: “Nia Organizaĵo dividas kun la esperantista Movado komunajn valorojn: esperon en konstruado de paca mondo, harmonian kunvivadon inter la popoloj, respekton al kultura diverseco, solidarecon trans la limoj.”

Mallonge dirite, UEA kredas je edukado por ĉiuj en lingvoj kiujn ili komprenas, je lingva justeco ĉiuaspekta kaj je mondo paca per edukado kaj kompreniĝo. Nia Asocio laboras por tiuj celoj en ĉiu angulo de la mondo, ligita de la Internacia Lingvo Esperanto. Ni alvokas al Unuiĝintaj Nacioj, UNESKO kaj ĉiuj laborantoj por daŭripova mondo, ke ni kune atingu la kvaran Celon por Daŭripova Evoluigo kaj la scion, egalecon, justecon kaj perspektivon kiuj akompanus tiun atingon.

INFORMACIJE / INFORMOJ izdaja / eldonas Zdrufenje za esperanto Slovenije / Slovenia Esperanto-Ligo, Štefanova 9, SI-1000 Ljubljana, Slovenija / Slovenujo. <http://www.esperanto.si>. Matična št. / kodnumero 1205226. ID za DDV / n-ro por AVI: 93737777. Poslovni račun / bankkonto: IBAN SI56 6100 0001 2538 761 pri / ĉe Delavska hranilnica d. d.. (Swift-kodo: HDELSI22). Uredil / redaktis Ostoĵ Kristan, lektoriral / kontrollegis Tomaž Longyka.

ISSN 2385-992X Naklada / eldonkvanto: 60

ISSN 2385-9628 URL: <http://www.esperanto.si/eo/bulteno-informacije-informoj-0>